

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 151^a
6. 8. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanoni (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.
Tarifon
vidu sur speciala foilo, kiu estas aldona
al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Impresoj.

Rothenburg.

Sonas ankoraŭ en miaj oreloj la ensorĉantaj melodioj de l' hieratia Madrigal-Koncerto, kiam la kruda sono de mia vekilo subite min ŝiras el ĉiuj



Prof. D-ro Rich. Ledermann
Prezidanto de L. K. K.
Vicprezidanto de la XV-a.

sonĝoj. De ekstere afable enrigardas matena sunradieto, kaj tuj mi forgesas dormon kaj sonĝojn. Pli rapide ol kutime mi vestas min, por ke mi ne maltrafu la specialan vagonaron, kiu nin kondukos al la fama Rothenburg.

Nun ĝi levigas antaŭ ni — la „Pompeji de l' Mezepoko“ — alte sur monteto; ĝiaj fortika muroj bastionoj kaj turoj venkonte eldiras al ni sian stonan saluton. Kaj super ĝi la plej blua ĉielo kaj la plej radianta suno, kiujn vi povus imagi.

Cu denove priskribi la urbeton? Tion jam sufiĉe faris la Kongreslibro kaj la sabata numero de E.T. Mi nur atentigas pri la neordinara kontrasto, kiun prezentis la antikva urbetulo, apenaŭ tuŝita de l' moderna tempo, kaj tiuj ĉi du mil fremduloj venintaj per plej modernaj trafikiloj el kvardek landoj de la vasta mondo, uzantaj por sia interkomprenigo la plej modernan lingvan ilon: la internacian lingvon Esperanto.

Oni ne satvidas la multajn interesaĵojn; ĉi minute alia perspektivo ĉarmigas la okulon. Tamen fine — bedaŭrinde tro frue — ekestas la horo de l' adiaŭo.

En la vagonaro, „hejmen veturante“ (la kongresurbo ja fariĝis al vi hejmo por via „Granda Semajno“), ni volis konstati, kiom da nacioj estis reprezentitaj en nia kupeo. Jen la rezultato: du germaninoj kaj po unu brito, ĉeĥoslovakiano, estoniano, finlandano, italo, jugoslaviano, polo kaj rumano.

Do sufiĉe internacia societo, kiu vikle interbabilis en nia Esperanto.

Subite iu el ni faris la bonhumoran proponon ke ĉiu ekipulo en sia propra gepatra lingvo. Jen por kelka tempo nia kupeo estis aliformiginta en duan Babelon. „Schrecklich, schrecklich!“ ekcriis unu de la germanaj fraŭlinoj kaj fingre fermis siajn orelojn, kiam ŝi aŭdis denove la „karan lingvon“. Bedaŭrinde la mondo faras la malon; ĝi fermas la orelojn, kiam ni parolas Esperanton, kaj ĝi vaste malfermas ilin, tamen ne komprenante, kiam ĝi aŭdas ion fremdan uacian lingvon.

Lacaj sed je kelkaj agrablaj impresoj pli riĉaj ni malfruespere reatingis nian „hejmon“ — la kongresurbon.

Adresaro

de la aliĝintoj por la XV-a Universala Kongreso de Esp. havebla en la kongresa vendejo (apud la vestejoj).
Prezo 25000 gmk.

Dua Laborkunsido.

La dua Laborkunsido komenciĝis, sub prezido de Prof. D-ro Dietterle, per diskuto, ĉu entute ĝi okazu aŭ ne, ĉar la disponigita ĉambro ne povis enteni la partoprenemulojn.

Preskaŭ duonan horon oni diskutis pri tio. Fine oni decidis ke la kunsido tamen okazu.

Poste oni aŭdis diversajn dezirojn pri la jarlibro de U.E.A.

S-ro Steffler komunikas ke ankaŭ kelkaj tagoj dromis oficisto de U.E.A., s-ro Humbel. — Komunikas elekton de du honoraj membroj, inter ili D-ro Privat, Esperantisto jam de 20 jaroj, komitatano de U.E.A. de 10 jaroj, memorigas ke s-ro Jakob laboras de 10 jaroj ĉe U.E.A. Esprimas al ili la dankon de U.E.A.

S-ro Privat raportas pri la Konferenco de Venezia kaj ĝiaj rilatoj al U.E.A.

S-o Jakob atentigas ke la Foiro de Frankfurt eldonis la raporton pri Venezia en lingvoj germana kaj Esperanta, kaj ke ĝi estas aĉetebla en la kongresejo.

S-ro Page raportas pri Centra Komitato.

Laŭ propono de s-o v. Frenckell la Prezidanto fermas la kunsidon, prokrastante kelkajn raportojn ĝis morgaŭ.

Kunsido de la Fed. p. Kom. Komerca Lingvo.

Tuj post mallonga neoficiala kaj klariga preparolo de la foiristoj okazis la kunsido de la Federacio. Ĉar el la estraro nur unu persono ĉestis kaj specialaj preparoj ne estas faritaj, oni proponis prokrastigon de la preparolo de la programpunktoj. Propono reorganizati la tutan laboron komercan kaj koncentrigi ĝin al la redakcio de „Internacia Komercio“ en konstanta kontakto al la federacio estas akceptita. La taskoj de la federacio ne ŝanĝas per tio. Oni intencas sole garantii, ke la kunlaborantoj-federacioj kaj nemembroj de la federacio povos kolekti ĝi la centro kaj esti varbata por la federacio.

D-ro Vogt, bankisto de Stuttgart poste faris mallongan referaton pri la problemoj de la Ĉekbanko Esperantista. Detalaj artikoloj sekvas dum la venonta tempo en la Esp. gazeto. S-ro Höhn, Luksemburgano, faris tre aŭdindajn rimarkojn pri la adapto de Esperanto en la kodistiko.

Post klarigoj de pluraj personoj tre aktivaj D-ro Vogt atentigas al la foira laboro en Frankfurt a.M. kaj speciale al la broŝuro ĵus aperigita de la foir-oficejo kaj enhavanta la raporton pri la konferenco en Venezia dulingve. Je la 12 h. la kunsido estas fermata.

Detalaj raportoj pri ambaŭ kunvenoj sekvas en venontaj numeroj de „ET“ respektive „Internacia Komercio“.

Praktika Demonstracio de Komercistoj.

Ĵaŭdon posttagmeze okazis en la kunsido de la Komerca Ĉambro sub la prezido de s-ro redaktoro R. Kreuz de „Internacia Komercio“ unua demonstracio praktika dum niaj kongresoj. Ĉestis preskaŭ 200 personoj. Nomo de la Komerca Ĉambro la vicprezidanto de la Ĉambro akompanite de la sindiko, bonvenigis la ĉestantaron per kelkaj Esp. vortoj kaj aldonis, ke la Ĉambro kiel antaŭe tiel ankaŭ en estonto kiel plej eble favoros Esperanton. Post enkondukaj vortoj paroladis: s-o v. Frenckell, ĝen. konsulo de Finlando pri „Tasko de la bankoj en la internacia sfero“ kaj s-ro H. Fischer, grandindustriisto el București pri „La Industrio de Rumanujo“, krome s-ro Pillhofer pri „Komerca Delegito“. Du oratoroj anonciĝintaj ne povis veni. S-ro Merchant-Sheffield estas operaciigita, s-ro v. Medem-Kowno por subite plenumotaj negocaj aferoj estas haltigita en Litovio. La paroladoj kaŭzis tre viglan diskuton kaj montris, ke la eksperimento estas salutata de seriozaj propagandistoj en la komerca sfero. Oni esprimis la deziron, ke dum la venontaj kongresoj oni aranĝu similan demonstracion kun diskutado.

Grava korekto.

Por evito de malkompreno.

Oni informas nin:

La bulgara registaro komisiis la ĝeneral-konsulon s-on Kaufman el Dresden viziti la XV-an Kongreson.



Bankisto D-ro Anton Vogt
Vicprezidanto de Germana Esperanto Asocio.

S-o Kaufmann, konstatinte la gravecon de la Esperanto-kongresoj kaj la dezirojn, se iel eble, aranĝi la XV-an en Sofia, telegrafis sian raporton al la registaro de Bulgarujo kaj malavare promesis apogi la kongres-aranĝojn per tre granda helpo, kondiĉe, ke kongreso estus ebla en Sofia. La invito de la kongreso al Sofia do ne jam okazis, sed la elekto de Sofia estas atendota. I.H.Kr.

Kongreso en Warszawa.

Al la komunikoj sendita al ni de la Fed. d. Esp. Societoj en Polujo ni ricevis proteston de s-o Eszigmán-Warszawa, delegito de Pola Esperanto Societo, kiu sciigas nin, ke nek la Federacio de Esp. Soc. en Polujo, nek la Societo „Laboro“ estas rajtigataj inviti kongreson aŭ rezigni pri ĝia arango. Laŭ la informo la nura organizo en Polujo estas Pola Esperanto Societo, kiu ankaŭ decidis pri tia afero.

Konsiderante la senpartiecon de „ET“ kaj nepovante kontroli la kontraŭstarajn informojn, ni lojale presas la proteston al ni donitan.

Gvidoj tra urbaj institutoj kaj fabrikejoj.

- 1) Vizito al la urba Gasfabrikejo:
Mardon, 7. aŭg., precize je 2 h. p. m. Renkontejo: Kongresejo, ĝardeneto antaŭ la restoracio.
- 2) Vizito al la Akvopurigejo Nürnberg-Sudo:
Mardon, 7. aŭg., precize je 2.30 h. p. m. Renkontejo: Kongresejo, antaŭ la enirejo en la Kongresejon.
- 3) Vizito al Fajrobrigadejo okcidenta:
Mardon, 7. aŭg., precize je 2.30 h. p. m. Renkontejo: Kongresejo, antaŭ la enirejo en la Kongresejon.
- 4) Vizito al Maschinenfabrik Augsburg-Nürnberg:
Mardon, 7. aŭg., precize je 1.15 h. Renkontejo: ĝardeneto antaŭ la restoracio (Kongresejo).

Oni tuj enskribu sin en la listojn, kiujn ni devas sendi al la urbo.

LOKA KONGRESA KOMITATO
Pillhofer.

Se vi ne jam estas abonanto,

abonu E. T.
ankorau dum la Kongreso.

